WIKIPEDIA

Lúčnica

Lúčnica (slovaka elparolo: /ˈluːtʃɲitsa/) estas folklora ensemblo en Slovakio, fondita en 1948 en Bratislavo. Ĝi konsistas el ĥoro kaj danca ensemblo.

Lúčnica	
Deveno	Slovakio
Ĝenroj	Folkloro
Aktivaj jaroj	ekde 1948
Retejo	lucnica.sk (http://www.lucnica.sk/)

Historio

La fondinto de Lúčnica estas la koreografino Oľga Chodáková. Lúčnica naskiĝis kiel “grupo de entuziasmaj junuloj asociita al la etnografia grupo Živeny”. En 1948, ĝi prezentiĝis en Slava agrokultura ekspozicio en Prago[1]. Post 65 jaroj da ekzisto partoprenis en ĝi pli ol 2000 homoj. Okaze de la 60-a datreveno de sia fondiĝo, ĝi prezentis en Bratislavo festan programon de la 21-a de novembro ĝis 1-a de decembro 2008. Ĝi okazis ankaŭ en la teatro Janáčkovo en Brno (parto de la Nacia teatro de Brno) kaj en la teatro Hybernia en Prago. Ekde 1951, la arta direktoro de Lúčnica estas Štefan Nosáľ, kiu antaŭe estis solisto en la ensemblo.

Referencoj

1. ↑ Turner, Marián. Jubilujúca Lúčnica oslavuje (http://www.jankohrasko.sk/clanok/15840/jubilujuca-lucnica-oslavuje/) (slovake) (2008-11-21). Alirita 2016-05-30.

Eksteraj ligiloj

- Oficiala retejo (http://www.lucnica.sk/)

Elŝutita el "https://eo.wikipedia.org/w/index.php?title=Lúčnica&oldid=6736150"

Ĉi tiu paĝo estis lastafoje redaktita je 17:17, 24 sep. 2019.

La teksto disponeblas laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite-Samkondiĉe 3.0 Neadaptita; eble aldonaj kondiĉoj aplikeblas. Vidu la uzkondiĉojn por detaloj.